

Esperanto-Brno

Esperanto-Brno - Informoj pri Brno - Legendoj

Pri fondo de burgo Veverí

Miroslav Hruška

(veverka = sciuro)

En Brno vivis juna duko, Konrado li nomiĝis. Li plezure ĉasis ĉasaĵojn. Tiam estis la ĉitieaj arbaroj plenaj de cervoj, damaoj kaj aproj. Trans deklivoj de Špilberk kaj Kraví Hora kuradis ĉasistoj kaj hundoj. Ili fakte kuris trans Žabovřesky en densajn arbarojn post Komín.

Foje la duko ekiris en arbaron kun aliaj ĉasistoj. Kio okazis! Li vidis belan damaon kaj ekkuris post ĝin kun levrelo, forgesis pri ĉio kaj devojiĝis. Li komencis trumpeti per sia ĉaskorno, sed senefike: li estis tiel malproksime en la arbaro, ke ĉasistoj ne povis lin aŭdi.

La junulo diris al si: „Restas nenio alia, mi devas mem trovi la vojon el la arbaro.“

La trapasigis sin tra vepro, la arbaro estis konstante pli kaj pli malhela kaj ĉiam pli kaj pli densa, tial li devis trahaki al si la vojon per ĉasista glavo. Li iris longe, longe, ĝis li fine venis en valon, kie fluis nigra rivero (Schwartzau = Svratka). Tute laca li sidiĝis sur musko sub granda kruta roko kaj ekdormis.

Li havis belan songon: Sur la kruta roko super la rivero staras bela burgo kaj en ĝiaj haloj sonas ĉasistaj kantoj. Tio estis io por la duko! Li jam eniris en la ĉasistan kasteleton, jam li volis manĝi kaj trinki, sed en tiu momento ... kia domaĝo - li vekigis!

Susurado en la vepra branĉetaro subite rompis lin. Li ektimis, ke ĝi estas lupo, rapide li ekstaris kaj ekpalpis glavon en sia glavingo. Sel el la branĉetaro elkuris nigra levrelo kaj tuj al la duko.

„Kion vi portas, montru!“ ekridetis la duko.

La levrelo portis en la buŝo sciuron. La duko ĉirkaŭrigardis kaj vidis multe da sciuroj. Ili klopodis forkuri antaŭ li kaj la levrelo, rapide saltis sur la rokon kaj grimpis supren. Kaj la junulo denove forgesis sian lacon, ne rememoris, ke la vespero proksimiĝas, kaj kun sia levrelo komencis persekuti la sciurojn. Kiam li ĉirkaŭkuris duonon de la roko, li ekvidis ermitan kabaneton.

Maljuna ermito bonvenigis lin, kuiris por li supon kun petroselo kaj la juna duko diris:

„Forkonduku min el la arbaro - mi bone pagos.“

„Kien vi irus en la nokto?“ demandis la ermito. „Kuŝiĝu en kamereto sur ursan felon - matene mi akompanos vin.“

Kiam tagiĝis, la duko ekstaris kaj petis la ermiton:

„Mi dezirus ĉirkaŭrigradi de sur la supro de la roko.“

Ili grimpis sur la rokon kaj la duko ĉirkaŭrigardis trans montetoj kaj ĉasbestaj teritorioj. Li vidis la vastan panoramon de la arbara regiono. Tio estus loko por ripozi post penega ĉasado! Denove li rememoris sian sonĝon kaj diris: „Ĉi tie mi konstruigos burgon kaj ĝia nomo estos Sciura - laŭ la sciuroj. Nun montru al mi la vojon - estas tempo iri hejmen.“

Post du jaroj estis la burgo super la rivero Svatka reale konstruita. La burgo havas naŭ turojn.

En burgo Sciura

altas naŭo tura!

Kiu dubas pri ĝi,

kuru konvinkiĝi!